# Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago № 4 Aprilo, 2016

*Kara Leganto, kvankam sur la kalendaro estas Aprilo, t.e. – printempo, sed foj-foje vintro memorigas pri si. Martan kunsidon vizitis gaston el Kongo kaj s-ro Mikaelo fariĝis nia samideano (vd. malsupre).*

*En ĉi n-ro de nia bulteno vi trovos ankoraŭ resumon de artikolo "English becomes Esperanto" (The Economist, 23.04.16), poemon de I. Franko (fragmento) kaj kelkajn utilajn informaĵojn.*

*Agrablan legadon. Ĝis la!* –La Redaktoro

## La Angla Fariĝas Esperanto



*"Mi estas por la sama kalendaro por la tuta mondo, same, kiel mi estas por la sama mono por ĉiuj popoloj kaj unu monda helplingvo kiel Esperanto por ĉiuj popoloj."*

–Mahatma Ghandi (Barata Pensulo)

Britio neniam estis tipa Eŭrop-Unia (EU) membro. Ĝi aliĝis nur en 1973, preskaŭ du jardekojn post la ses originalaj membroj fondisis la Eŭropan Ekonomian Komunumon. Ĝi estas pli liber-komerca, pli Atlantika ol la kontinenta. Kaj ĝi estas la nura lando por okazigi referendumon pri foriro en 1975, por ne mencii la duan, en venanta junio.

Tio ĉi estas nenormale, ke la institucioj de EU estas regataj de la lingvo de plej malobeema membro. Jure, la 24 oficialaj lingvoj de la 28 membroj havas egalan statuson. Laŭgrade tamen la angla delokigis la francan kiel la plej vaste uzata lingvo inter ambaŭ burokratoj kaj parlamentanoj, kiuj ne havas komunan gepatran lingvon. Malgraŭ tio, multaj franc-parolantoj ankoraŭ atendas ke, dum ajna kunsido, estos akceptebla transiro al la franca. Neniuj alialingvaj parolantoj supozas tion, kvankam germana estas ofte nomata la tria laborlingvo.

Tiel la angla estas pli unua inter egalaj, malgraŭ la fakto ke la britaj voĉdonontoj eble favoros lasi EUon. Tiam okazos stranga fakto: unio de pli ol 500 milionoj estos regata de la lingvo, parolata oficiale nur en la Respubliko de Irlando (loĝantaro 4.6 miliono) kaj Malto (kie ĝi estas ko-oficiala sur la insulo de 450.000). Kreskanta nombro de ali-lingvanoj parolantaj la anglan en 2012 raporto montras, ke 38% de la EU-civitanoj parolas ĝin kiel fremdan lingvon. Ankaŭ preskaŭ ĉiuj el oficistoj ĉe EU-institucioj en Bruselo. Kio okazus kun la angla sen angloj?

Kio pri la aliaj eŭropaj lingvoj? La francoj revus restarigi malnovan superecon de sia lingvo. Tio ne okazos: la franca akademiano, kiu en 2007 sugestis, ke la franca devas esti la unu-sola leĝa lingvo en UE (dank' al lia supozebla precizeco) estis certe kompatita kaj ankaŭ primokita. Sed rolo de la franca kiel la dua lingvo de la EU estas certigita, kvankam kelkaj malnovaj manoj ankoraŭ preferas ĝin kiel interlingvo. Malgraŭ la ekonomia forto kaj politika konfido de moderna Germanio, germanoj ne entuziasmiĝas puŝi sian lingvon super aliaj.

Tio faras strangan rezulton. Britio povas esti polusiĝanta, nekutima EU-membro, sed la angla iĝis neŭtrala, utila pro tio, ĉar aliaj komprenas ĝin. Ĝia ligo kun Britio jam malfortiĝis. Revuloj longe esperis pri neŭtrala helplingvo, kiu estus komuna al ĉiuj. Iuj eĉ prenis al si taskon de inventado de tiaj lingvoj. Kiu scias? La angla povus iam plenumi la rolon destinitan por Esperanto. *–Preparis Araneo*

## E-Kastelo Gresillon Invitas:

La franca Esperanto-kastelo Grésillon invitas vin lerni kaj ferii.
2016-jun-12/17: La Luaro laŭ la vortoj, turisma semajno laŭ verkistoj
2016-jul-04/15: Dektaga kurso pri la esprimo de la tempo en Esperanto
2016-aŭg-06/13: SOMERAS, la Esperanto-studad-semajno post FESTO
2016-aŭg-21/28: Festa semanjo por infanoj, adoleskantoj kaj familioj
Kontakto: kastelo@gresillon.org, +33-2.41.89.10.34, http://gresillon.org/kontakto

*En Ukrainio 2016 estis proklamita jaro de Ivan FRANKO (1856-1916), okaze de 160-a datreveno de lia naskiĝo kaj 100-a de la morto. Antaŭ unu semajno la Ŝikaga ukraina teatro "Homin" prezentis mono-spektaklon "Moseo" laŭ samnoma poemo de I. Franko. Ĝi estas profunde filozofa verko pri la estonteco de l' ukraina popolo, pri konflikto de generacioj, pri rilatoj inter tribestro kaj popolo ktp. Nun estas proponata prologo al la poemo.*



# MOSEO (Prologo)

Popolo mia, plene turmentita,
simila paralizan mizerulon,
per moko kvazaŭ per la krust' kovrita!

Ne povas nokte fermi la okulojn
pro maltrankvil' pri via estonteco,
pro honto, bruligonta posteulojn.

Ĉu vere estas via vio-senco –
fiksita fate sur tabul' el fero –
nur sterki grundon por la fremdpotenco?

Ĉu efektive mankas ind-afero,
ke senlimecon de l' forteg' vi montru?
Ĉu vi eterne restos sur la Tero

nur kaŝmalica, falshumila monstro,
per rabo kaj perfido katenita,
sen vol' per fort' rezisti kontraŭ?

Ĉu multaj koroj, bonmemoron indaj,
je vi per am' plej sankta ardis vane?
Kaj vane vivon estis oferintaj?

Ĉu al la lando, priverŝita sange
per siaj filoj, malpermesos sorto
paradi kun fier', libere, sane?

Ĉu tute sen bezon' en via vorto
fajreras sprit', mildec', impeto, ardo,
al pens' povantaj doni decan forton?

Ĉu tute sen efik' en via kanto
aŭdiĝas ĝem', konsol', esper', sopiro,
sonora rido, plendoj de amanto?

Ho, ne! Ne nuraj larmoj kaj vespiroj
as via sort! Mi kredas sav-eventon,
al tag' de via el la tomb' eliro.

Ho, se mi kaptus trafe la momenton
kaj dum la tiu trovus ĝustan vorton,
sanigan, donacantan flam-impeton!

Se kreus kanton mi mistere fortan,
ke milionojn ĝi flugigu kaj inspiru
kaj ilin al Benita voj' kunportu!

Se mi!.. Sed ni, kun nia vant-aspiro,
per duboj disŝiritaj invalidoj,
ne rajtas gvidi vin al bataliro!

Sed venos temp', kaj vi kun arda vido
en de popolaj sendependaj rondo
ekbrilos de Kaŭkazo ĝis Beskido.

Disigos famon Nigra-Maraj ondoj
pri l' liberec'. Vi – mastro hejmsolida –
fiere vidos viajn kampojn, montojn.

Akceptu l' kanton, per angor' vinditan,
sed kredo-plenan; drastan, sed sagacan;
por la estont' – partpagon larmverŝitan,
kaj por genio via – nupt-donacon.

*1905*
*Tradukis Aleksandr Koroleviĉ*

**Adreso:**

Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Randy Ream
1835 N. Natoma Ave., Chicago, IL 60707
773-262-7738
www.esperanto-chicago.org

**Estraro:**

Prezidanto – D-ro Les Kordylewski
Vicprezidanto – Randy Ream
Eksprezidanto – Viktoro Pajuk
Sekretario – Tina Seastrom
Kasisto – Karlo Gunn
Membro – Hans Becklin

**MEMBROKOTIZOJ**

Membro-subtenanto: $40 jare;
Familia membro: $30,
Regula: $20
Studento aŭ pensiulo: $10.

Gifts are welcome also.
Dues are needed for the routine expenses of the Society and reported on our website.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago,
and mailed to our Treasurer, Charles Gunn
828 S. Ada St, Chicago IL 60607-4105

**SEKVANTAJ KUNSIDOJ**

1350 N. Wells St., Ŝikago. Bonvenon! Apudas stacioj: Sedgwick (Bruna linio) kaj Clark/Division (Ruĝa linio). Por senpaga parkejo bv telefoni al Viktoro: (773) 344-2276. Vi rajtas preni vian ŝatatajn ne-E-amikojn, manĝaĵojn kaj trinkaĵojn (dolĉakvon, bieron, vinon ktp).

**26an de Aprilo** – Pri moskva bardo Vlad Vysockij rakontas Araneo

**24an de Majo** – Gvidos Randio

**26an de Junio** – Tradicia E-pikniko

# Membro kaj Gasto

Gasto (sur la foto – blue sidas): mi estas Nlandu Luyala, Esperantisto de 1990. Mi lernis E-on en Lukala – lulilo de E-movado en nia lando DRKongo. Mi estis vic-prezidanto de la klubo "Stelaro de Lukala" kaj ĉe la landa asocio de DKEA (Demokratia Kongolanda E-Asocio). De Aŭgusto 2015 mi loĝas en Grayslake, IL.

Membro (ruĝe staras): Mikaelo Whitmore estas traŭmatologo kaj ĵus eklernis la ILon, sed jam fariĝis membro de nia E-societo kaj de Esperanto-USA. Post la kunsido li konfesis: "It was really cool to hear spoken Esperanto by real people for the first time in my life".

